

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San Marino

Internationale
Akademie
der Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

PROGRAMO

de la DUDEKDUA SANMARINECA
UNIVERSITATA STUDADSESIO

SUS 22

Hradec Králové · Čehio

2000.06.09 – 13 / 1699 pŕR

Ventiduesima Sessione Universitaria Sanmarinese
dell'Accademia Internazionale delle Scienze (AIS) San Marino

Zweiundzwanzigste Sanmarinesische Universitäre Studentagung
der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino

Twenty-second Sanmarinian University Session
of International Academy of Sciences (AIS) San Marino

Vingt-deuxième Séance Universitaire Sanmarinienne
de l'Académie Internationale des Sciences (AIS) San Marino

*Laborlingvoj · Lingue di lavoro · Arbeitssprachen · Working languages · Langues de travail ·
Pracovní jazyky budow:*

la Internacia Lingvo (ILO) · italiano · Deutsch · English · français · čeština

Adreso de la studadsesio:

PDF, Vysoka Skola Pedagogicka, Hradecka 1227/4
CZ-500 02 Hradec Králové
(tel. +42/49-506 11 11)

La SUS-oficejo akceptas la partoprenantojn la 9an de junio 2000 ekde la 19a horo.

I. OFICIALAĴOJ

Vendrede (00-06-09), post la Asembleo de la Subtena Sektoro (18:00–19:00), okazos la inaŭguro de la 22a SUS, komenciĝanta je 19:30.

Sabate (00-06-10), kunsidos la membroj de la ekzamenofico (17:15–17:30), ĉe kiu la AIS-kandidatoj ekzameniĝontaj dum la sesio povos konsultiĝi (19:30-20:00). Samtage okazos kunsidoj de la AIS-sekcioj (19:10–19:30).

Dum la ferma tago de la 22a SUS (*mardo*, 00-06-13) la publikaj finaj ekzamenoj komenciĝos je 9:30. Sekvos ilin la kunveno de la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro (11:00–11:45). Post mallonga paŭzo, je la 12:00 komenciĝos la publika solena fermo de la sesio.

II. SCIENCAJ KURSOJ KAJ LEKCISERIOJ

La sekvaj kursoj validas po unu studunuon kaj okazos ekde sabato (2000-06-10) ĝis lundo (2000-06-12):

Kibernetiko (salono Schmidt)

K 01 OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER, München (D)
Kulturaj aspektoj de komputil-programado
10a de junio: 9:15–10:45, 15:45–17:15; 11a de junio: 14:00–15:30;
12a de junio: 14:00–15:30.

K 02 OProf. Dr. habil. Helmar FRANK, Paderborn (D)
Aplikadexemploj de la informaciteorio en la branĉoj de la komunikadkibernetiko
10a de junio: 11:00–12:30; 11a de junio: 9:15–10:45, 15:45–17:15;
12a de junio: 11:00–12:30.

Humanistiko (salono Komenský)

H 01 PDoc. Dr. habil. Vera BARANOVSKÁ-FRANK, Paderborn (D)
Etnolingvistiko de Eŭropo
10a de junio: 14:00–15:30; 11a de junio: 11:00–12:30;
12a de junio: 9:15–10:45, 15:45–17:15.

Struktursciencoj (salono Euklides)

S 01 OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr., Göttingen (D)
Topologiaj grupoj
10a de junio: 11:00–12:30; 11a de junio: 11:00–12:30;
12a de junio: 9:15–10:45, 15:45–17:15.

Natursciencoj (salono Galilei)

N 01 OProf. Hans Michael MAITZEN dr., Wien (A)
La aĝo de nia universo
10a de junio: 14:00–15:30; 11a de junio: 9:15–10:45, 15:45–17:15;
12a de junio: 11:00–12:30.

Morfosciencoj (salono Gandhi)

M 01 AProf. Dr. Günter LOBIN dipl. paed., Paderborn (D),
ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Haag/Amper (D)
Politikaj kaj ekonomiaj kaŭzoj de problemoj de la virinoj
10a de junio: 9:15–10:45, 15:45–17:15; 11a de junio: 14:00–15:30;
12a de junio: 14:00–15:30.

III. PRELEGOJ

H-p1 ASci. Mag. Gerd-Harro SCHUHMANN dipl. ing., Aachen (D)
Effizienz im Unternehmen durch Anwendung geeigneter Qualitätsmanagement- und Audit-Systeme
10a de junio (sab.), 17:30–18:10, salono Komenský

N-p1 ADoc. Mag. Alicja LEWANDERSKA-QUEDNAU, Haag/Amper (D)
Kaŭzoj kaj sanigeblecoj de glaŭkomio kaj katarakto — per naturmedicinaj rimedoj
10a de junio (sab.), 18:10–18:50, salono Galilei

H-p2 AProf. Wolfgang VIERECK dr., Bamberg (D)
On the cultural history of Europe: Some research results of the Atlas Linguarum Europae (debutprelego)
11a de junio (dim.), 17:30–18:30, salono Komenský

H-p3 ADoc. Dr. Danuta SADOWNIK, Jelenia Góra (PL)
Anoreksio kaj bulimio — ĉu nur doloroj de la XXa jarcento?
11a de junio (dim.), 18:30–19:10, salono Komenský

IV. KANDIDATAJ FINEKZAMENOJ

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazos la *13an de junio* (mardo) laŭ la afiŝota horaro. La kandidat-prelegoj estas publikaj. Buŝaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj — se necesas — okazos dimanĉe. Precizan horon sciigos la ekzamenantoj.

Ĉiu kandidato nepre devas i.a. prezenti antaŭ sia finekzameniĝo almenaŭ 3 kursojn de SUS (akireblajn ankaŭ dum la sesio, dum kiu okazos la fina ekzameno), inter kiuj minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu oni kandidatiĝas, minimume unu — el la alia. En almenaŭ unu SUS-kurso la kandidato devas partopreni la ekzamenon ricevante minimume la noton 6/10.

La ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa, regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la ekzamenofico povas kaŭzi aŭ rifuzon de havigo de mankantaj eroj nur post la publika fina ekzameno aŭ pagendan rekompencan superantan la normalan ekzamenkotizon pro la kromlaboro. Finan konstaton pri la plenuminteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado ĉe AIS oni ne plu ricevos pli ol du jarojn post la finekzameno. Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se eventuale skribe fiksitaj kompletigpostuloj ne estos dum tiuj du jaroj plenumitaj de la kandidato. *Por eviti tiajn problemojn bv. ankoraŭfoje certigi, ĉu ĉiuj viaj ekzamendokumentoj jam troviĝas ĉe la ekzamenofico!*

V. KADRA PROGRAMO

En la kadro de la ĉi-jara studadsesio la kibernetika sekcio kunaranĝas apartan programparton. Ĝi komenciĝos la *12an de junio* (lundo) kaj daŭros 3 tagojn. Ĝin koncernantaj konferencmaterialoj estas surloke akireblaj.

Tradicie AIS invitas ĉiujn partoprenantojn de la sesio al la **Akademia Forumo** kun publika diskuto (dimanĉe, 2000-06-11, 21:00–22:00). La temo estos diskonigita komence de la sesio. La forumo okazos en la salono Boulanger.

Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj

Ĉiu SUS-partoprenanto rajtas senpage sekvi kursojn kaj prelegojn (tion jam inkluzivas la aliĝkoto). Kontraŭ aparta enskribiĝkoto al kursoj (je kurso 0,3 AKU; 50%-a rabato ekzistos nur por orienteŭropanoj) oni ricevas oficialan ĉeestateston (ĉeestinte minimume 3/4jn de kurso) sen noto, aŭ — se oni sukcese partoprenis la kursfinan ekzamenon — kun noto. La kursfina ekzameno estas ripetibla.

La kursfinaj ekzamenoj okazos lunde kaj marde dum tempointervalo difinita de la kursgvidantoj. Pro administraj kaj organizaj kialoj ni atentigas: kiu intencas akiri kursatestojn, bv. frue — laŭeble dum la akcepto (vendrede, la *9an de junio*) — enskribiĝi al la kursoj ĉe la SUS-oficejo.

Prelegoj

La prelegoj estas gvidataj de la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ de taskigitaj de ili. La partopreno en unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en lekciserioj) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno.

Debutprelegojn prezentas novalvokitaj profesoroj, *docentiĝprelegojn* — estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. La prelegoj daŭras po 45–60 minutojn (inkluzive diskuton kaj paŭzeton).

La sama tempo estas je dispono por *invititaj prelegoj* (en iu ajn oficiala lingvo de AIS) kaj por *projektaceptigaj prelegoj* (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan originalan akiron (ne: adopton) de titolo ĉe AIS.

Ankaŭ de liberaj ISKanoj (t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS) estas akcepteblaj t.n. *liberaj prelegoj* — pere de la dekanoj de la koncerna sekcio. Ili rajtas okazi en iu ajn oficiala lingvo de AIS kaj daŭri ĝis 25–40 minutojn.

Ankaŭ *koncizprelegoj* (10–20 minutaj) rajtas okazi en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili estas ankoraŭ post la starigo de la SUS-programo oferteblaj pere de la (vic-)dekano aŭ (vic-)fakarestro de la koncerna sekcio. Ĉiuj temoj de kromaj koncizprelegoj ne surlistigitaj en la programkajero estos bontempe afiŝataj dum SUS laŭ la indikoj transdonitaj de la prelegontoj al la SUS-oficejo.

Aliĝo

Bv. uzi la apartan aliĝilon kaj resendi al la senata sekretario (ADoc. Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; blewol@hrz.uni-paderborn.de; tel.: +49/551-376072). Bv. ankaŭ al ŝi direkti viajn demandojn kaj kurs/prelegopropojn.

La SUS-aliĝo rajtigas vin:

- partopreni publikajn oficialaĵojn kaj ĉiujn erojn de la kadra programo, pri kiuj la programbulteno aŭ SUS-ofico ne informas pri aparta pago,
- partopreni ĉiujn kursojn kaj lekciseriojn (sen rajto ekzameniĝi), prelegojn kaj ekzamenigojn,

(la venontaj du punktoj ne validas por partoprenantoj aliĝintaj nur al la aparta kibernetika programo)

- ricevi la programkajeron kaj, fine de la sesio, partoprenantaronliston,
- ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregulan aliĝon (por AIS-studentoj la insignon anstataŭas ilia aktuala legitimilo).

La aliĝkoto estas pagenda ankaŭ de *kursgvidantoj* kaj *prelegontoj* (nepre antaŭ la limdato por anonciĝo je *2000-01-09*; sen antaŭe konstatebla pago de la SUS-aliĝkoto la anonciĝoj ne povas esti konsiderataj por la programo). La *kandidatiĝo* estas pritraktebla ankaŭ nur post la alveno de via SUS-aliĝkoto. Anoj de ĉiuj AIS-sektoj povas pagi per sia individua konto ĉe la akademio. *(daŭrigo sur la paĝo 9)*

	sekcio/salono	9:15–10:45	11:00–12:30
VENDREDO 2000-06-09 /1699 pŕR	Boulangier Boulangier		
SABATO 2000-06-10 /1699 pŕR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	H 01 Fössmeier M 01 Lobin/Lewand.-Q.	K 01 Frank S 01 Holdgrün
DIMANĈO 2000-06-11 /1699 pŕR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Frank N 01 Maitzen	H 01 Barandovska-F. S 01 Holdgrün
LUNDO 2000-06-12 /1699 pŕR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Euklides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	H 01 Barandovska-F. S 01 Holdgrün	K 01 Frank N 01 Maitzen
MARDO 2000-06-13 /1699 pŕR	Boulangier Boulangier	Publikaj finekzamenoj ekde 9:30	Ĝenerala Asembleo (SciS) 11:00–11:45 Solena fermo 12:00–12:30
MERKREDO 2000-06-14 /1699 pŕR		<i>kibernetika konferenco</i>	

14:00–15:30	15:45–17:15	17:15–19:30	poste
		Asembleo/SubS 18:00–19:00 Inaŭguro 19:30	senatkunsido (nepublika) 21:15–22:45
H 01 Barandovska-F. N 01 Maitzen	H 01 Fössmeier M 01 Lobin/Lewand.-Q.	ekzamenofico 17:15–17:30 (Euklides) H-p1 / * / * 17:30–18:10 (Komenský) * / N-p1 / * 18:10–18:50 (Galilei) sekcikunsidoj 19:10–19:30	ekzamenofico - konsultoj - 19:30–20:00 (Euklides)
H 01 Fössmeier M 01 Lobin/Lewand.-Q.	K 01 Frank N 01 Maitzen	H-p2 / H-p3 17:30–18:30 / 18:30–19:10 (Komenský) * / * / * / * / *	Forumo pri Akademias Rekomendoj 21:00–22:00 (Boulangier)
H 01 Fössmeier M 01 Lobin/Lewand.-Q.	H 01 Barandovska-F. S 01 Holdgrün	* / * / * / * / *	
<i>kibernetika konferenco (daŭrigo)</i>			

* aliaj, surloke anoncblaj prelegoj en diversaj sekcioj

La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentaj personoj:

BOULANGER, George R. (1909–1982)

Fondinto (en 1957) de l'Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asocion 1980 ILOn kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciatgrupo AIS.

DESCARTES, René, latine: Renatus Cartesius, (1596–1650)

„La patro de moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante por ambaŭ racian metodon. Sian mekanikecan mondpercepton li aplikis eĉ en la psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en letero de la 20a de novembro 1629 al la benediktana scienculo Mersenne.

EUKLEIDES de Aleksandrio (ĉ. 300 a. K.)

Greka matematikisto kaj natursploristo, kiu laboris sub Ptolomeos I ĉe la „Muscion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manualon „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

GALILEI, Galileo (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksimodeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li ne plu verkis en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

GANDHI, Mohandas Karamchand (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

KOMENSKÝ, Jan A., latine: Johannes A. Comenius (1592–1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

SCHMIDT, Hermann (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la germana fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerigkibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio (t.e. ĝis la 2000-05-09) la aliĝkoto estas nur 0,3 AKU; post tiu dato ĝi kreskas al 0,5 AKU. La koto estas pagebla laŭ la jenaj manieroj (bv. nepre indiki la pagocelon kaj nomon de la aliĝanto):

- al la AIS-konto n-ro 2051-305 ĉe poŝtbanko Hannover (bank-kodo 25010030)
- ĉeke — senpere al la trezoristo: OProf. B.-A. Wickström, Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, D-10178 Berlin; tiukaze bv. nepre aldoni (egalvaloron de) 10,- EUR pro la bankkotoj

Kurskotoj kaj ekzamenkotoj estos rabatitaj je 50% por la partoprenantoj el la reformeŭropaj landoj.

Civitanoj de kelkaj landoj bezonas ankoraŭ vizon por alveturi Ĉeĥion. En tiu kazo bv. frue anonci tion al la lokaj organizantoj (al la gvidanto de la Ĉeĥa AIS-Asocio, s-ro Zdenek Pulpan, zdenek.pulpan@vsp.cz).

Tiuj dumvivaj subtenaj membroj kaj AIS-studentoj posedantaj validan studentan AIS-legitimilon akiritan antaŭ la 20a SUS estas liberigataj de la aliĝkoto, kiuj aliĝas *minimume unu monaton antaŭ* okazigo de la studadsesio al la senata sekretario; alikaze estas krompagenda 0,2 AKU.

Personoj, kiuj intencas estonte ekzameniĝi ĉe AIS povas ricevi studentan legitimilon (la finekzamenantoj devas aŭ posedi aŭ esti posedinta la legitimilon kun la celata scienca grado). Ĝi validas ĝis la atingo de la studadcelo, sed ne pli longe ol 5 jarojn, kaj estas akirebla kontraŭ 0,5 AKU ĉe la senata sekretario ankaŭ dum la sesio mem. Interesatoj bv. disponigi sian aktualan foton.

Bonvolu atenti, ke aliĝkoto ne kovras ekzamenkotojn, kurskotojn, tranoktokotojn ktp.

Loĝado

Ĝis la 31a de majo la organizantoj peras tranoktejojn en studenta domo. Restadon en hoteloj (pluraj troviĝas en la urbocentro) bonvolu memstare aranĝi, same kiel nutradon. La hotelkotoj varias inter 25–35,- EUR.

Mono

Kadre de AIS kotoj kaj prezoj estas indikataj ĝenerale en AKU (Akademiaj Kotoj-Unuoj). 1 AKU valoras nun 65 eŭrojn. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de la Internaciaj Scienca, Arta kaj Teknika Kolegioj (ISK, IAK, ITK) de AIS havas individuan subkonton („servobonhavo“), de kiu eblas i.a. senkosta ĝiro al aliaj individuaj AIS-kotoj, kaj pago al AIS.

Al servobonhavo estas aŭtomate alkalkulataj honorarioj (ekz. pro la realigita kurso aŭ prelego akceptita por la antaŭe presita programo), aŭtomate dekalkulata jar-komence estas la memborkoto. Kromaj dekalkuloj okazas laŭ sciigo de la servobonhavo-posedanto (ekz. aliĝkotoj), se la kontostato tion ebligas.

Ĉe la SUS-oficejo ne eblas ŝanĝi monon inter diversaj monistemoj.

Kulturaj aspektoj de komputil-programado (OProf. Dr. habil. Reinhard Fössmeier)
Ĉu komputil-programado rilatas al kulturo? Ĉu ĝi diferencas laŭ kulturoj, etnoj aŭ geografiaj? La kurso celas montri, kiom la programado de komputiloj rilatas malpli al maŝinoj ol al homoj, iliaj menso, pensado kaj mondkoncepto. Ĝi prezentos ekzemplojn el la historio kaj komparoj kun aliaj kampoj de la homa kaj scienca vivoj. Ĉar la kursestro estas komputilisto, sed ne etnografo, tre bonvenas kontribuoj el la spertoj kaj scioj de la kursanoj.

Topologiaj grupoj (OProf. Horst S. Holdgrün dr.)

Kiam diversaj matematikaj fakoj kontribuas al sama temo, tiam ekestas la plej belaj kaj fruktodonaĵaj rezultoj. Unu el tiaj temoj konsistigas la topologiaj grupoj, kies traktado postulas algebrajn, geometriajn kaj analitikajn metodojn. En la kurso mi prezentos la bazajn ecojn, kaj montros, kiel la diversaj fakoj aplikigas, por helpi kompreni la strukturon de topologiaj grupoj. Ili cetere ludas gravan rolon kaj en la nombroteorio kaj en la moderna fiziko.

Etnolingvistiko de Eŭropo (PDoc. Dr. habil. Vera Barandovská-Frank)

Estas malfacile lingve limigi Eŭropon, ĉar lingvolimoj ne koincidas kun la limoj geografiaj. La tradicie plej forta lingvofamilio estas la hindeŭropa. Intereso pri lingva parenceco kaj literatura kreado datiĝas ekde la 18a jc. kaj harmonias kun romantismaj ideologioj, inter kiuj keltismo, pangermanismo kaj panslavismo estis la plej interesaj. Tradiciaj etnaj zonoj en Eŭropo estas: romana, bizanca, ĝermana, slava kaj balta. Krome ekzistas diversaj substrataj kaj adstrataj lingvoj. Ekde la 19a jarcento ekzistas ilia klasigo kaj priskribo.

Aplikadekzemploj de la informaciteorio en la branĉoj de la komunikadkibernetiko (OProf. Dr. habil. Helmar Frank)

La komunikadkibernetiko estas tiu alo de la antropokibernetiko, kies kvar branĉoj (informacipsikologio, informaciestetiko, klerigkibernetiko kaj lingvokibernetiko) esploras la informpritraktadon en homaj individuoj aŭ en malgrandaj homgrupoj. La mezuro, kiun enkondukis 1948 Shannon por la „informacio“ t.e. por la transportmalfacilo („pezo“, „inerto“) de informo, montriĝis (post ioma ĝeneraligo kaj modifita interpreto) taŭga ankaŭ por laŭkvanta priskribo kaj ekspliko de la homa aperceptado kaj lernado — kaj, sekve, de estetikaj kaj lingvistikaj fenomenoj kaj pedagogiaj metodoj.

Politikaj kaj ekonomiaj kaŭzoj de problemoj de la virinoj

(AProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed., ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau)

Intenco de tiu kurso estas prezenti skize la rolon de la virinoj ek de la periodo de sufraĝestinoj ĝis nun precipe sub politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj. Estas reliefigitaj tiuj kaj aliaj aspektoj (kulturaj, tradiciaj) por la vivo de virinoj en la familio, laboro kaj ĝenerale en la socio. De kelkaj famaj kaj konataj politikistinoj, aktorinoj kaj sciencistinoj estos prezentitaj vivpriskriboj, kiuj montras tipajn agadojn por plibonigi la virinan situacion en la socio. Krome estos preparolataj revoj, legendoj, sed ankaŭ malfacilaj kondiĉoj en la nuna mondo.

La aĝo de nia universo (OProf. Hans Michael Maitzen dr.)

La determino de tiu aĝo limigas du esencaj argumentoj: Laŭ la ĝenerala ekspansio de nia universo trovita de Edwin Hubble antaŭ 80 jaroj la praeksplozo okazis antaŭ proksimume 15 miliardoj da jaroj (kun malcerteco de 5 miliardoj da jaroj). La alia punkto estas la aĝo de la plej maljunaj objektoj en nia propra Galaksio, la Laktvoja Sistema: ties aĝo estas inter 10 kaj 14 miliardoj da jaroj. Diskutotas la stato de la aĝdetermino surbaze de la plej lastaj empiriaj datumoj devenantaj ĉefe de la satelita teleskopo HIPPARCOS de la Eŭropa Spacagentejo ESA, kies rezultoj estis publicitaj antaŭ precize tri jaroj.